Ni Ĉiuj

Duonjara Revuo de Meksika Esperanto Federacio.

Numero 2/2009

INTERNACIAJ RENKONTIĜOJ: KONSTANTA FONTO DE ENERGIO POR LA ESPERANTISTARO

La 95a Universala Kongreso de Esperanto: Interkompreniĝo de kulturoj

ANTAŬPAROLO

Ordinare mi demandas la homojn kio estas unu el la plej valoraj aspektoj, kiuj Esperanto lasis al ili… la respondoj estas diversaj sed la plej ofta estis ke, per la Internacia Lingvo, ili havis la eblon koni ulojn el diversaj landoj kaj kune kun tio, ilian kulturon, vivmanieron kaj kutimojn, t.e, scii iom pli pri la mondo per neŭtrala komunikilo.

Por tion fari ne nepras vojaĝi kaj persone kunrilati kun aliaj esperantistoj. Antaŭ jaroj, la papera korespondado estis la ĉefa medio por ebligi la komunikadon inter homoj de diversaj urboj aŭ landoj. Nuntempe la teknologio helpadas pli oftan kaj efikan kontakton inter samideanoj, sed kio pri la proksima, vizaĝ' al vizaĝ' renkonto?

De tempo al tempo samlandaj esperantistoj rekontas sin por praktiki Esperanton, sed kelkfojoj tiuj anoj revenas al la nacia lingvo, eble ĉar venas komencantoj, ĉar oni sentas sin pli komfortaj por esprimi sin, ktp., sed kiam oni vere devas uzi la verdan lingvon estas kiam la homoj venas el diversaj landoj, kiam la renkontiĝoj estas vere internaciaj.

En tiu ĉi numero de "NI ĈIUJ" ni traktos tian temon prezentante al vi spertojn de homoj, kiuj per sia verko memorigos al ni eble similajn proprajn travivaĵojn aŭ invitos nin sperti tiun neforgeseblan etoson. La eblo estas antaŭ ni, la venontan julion ni povus (re)sperti kelkajn el la plej gravaj internaciaj renkontiĝoj en Esperantujo; tio estas, la Universala Kongreso de Esperanto, la Internacia Junulara Kongreso kaj la

ILEI-Konferenco kaj ĉiuj en la najbara lando Kubo! Bonŝance por ni, Meksiko troviĝas tre proksime de tiu bela lando. Do, venu al Kubo la venontan someron!

Kompreneble ne mankas en tiu ĉi dokumento la ĝeneralaj temoj rilataj al la nacia movado; historio, instruado kaj novaĵoj. Fine kiel ĉiam, tiu ĉi bulteno eblis danke al la afabla kunlaboro de pluraj personoj, kiuj tutkore kaj vigle dividas kun ni siajn konojn kaj spertojn. Ankaŭ mi dankas al José Cruz Pacheco pro la belaj karikaturoj speciale faritaj por tiu ĉi numero kaj al Ĉina Internacia Radio por la permeson uzi foton de la 75a UK publikita en ĝia retpaĝo.

Karaj samideanoj, nun ek, komencu kaj ĝuu la legadon!

Mallely Martínez Mateos

Prezidantino de Meksika Esperanto Federacio

ENHAVO

ANTAŬPAROLO 2

INTERNACIAJ RENKONTIĜOJ: KONSTANTA FONTO DE ENERGIO POR LA ESPERANTISTARO 5

Ek al Universala Kongreso! – Fidel Figueroa Martínez. 5

Mia unua partopreno al Universala Kongreso (UK) – Jean Codjo. 7

Novjara renkontiĝo por familioj kaj unuopuloj – Lu Wunsch-Rolshoven. 9

Virtualaj Kongresoj – Milan Sveda. 11

POR LA HISTORIO DE ESPERANTO EN MEKSIKO **12**

5a TAKE, alia ekzemplo de kuna laboro en Meksiko – Michael Porter. 12

LA 95a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO: INTERKOMPRENIĜO DE KULTUROJ **15**

PRI LA INSTRUADO DE ESPERANTO EN MEKSIKO **17**

La oraĝo – Sofía Carbot Rodríguez. 17

La Esperanto-instruado en mia lernejo – Alberto Montero. 18

LASTAJ RIMARKINDAJ AKTIVECOJ EN MEKSIKO **20**

PRI EKSTERLANDA AGADO **22**

INTERNACIAJ RENKONTIĜOJ: KONSTANTA FONTO DE ENERGIO POR LA ESPERANTISTARO

EK AL UNIVERSALA KONGRESO!

Fidel Figueroa Martínez

- Jes! Ja "Ni Ĉiuj" ek al Universala Kongreso, ĉar nun okazos tre proksime de "Ni"... En nia frata lando Kubo! Jen. Do, granda ŝanco por duan fojon frandi tutmondan kunvivadon en mozaika etoso internacia, spertante nian karan komunan lingvon.
- Jes! Ja la duan fojon por tiuj kiuj feliĉe antaŭ 20 jarojn partoprenis la unuan; kaj kiuj nun akompanos la junajn kuraĝulojn.

Al la 75-a U.K. en Havano aliĝis 1617 personoj el 54 landoj. La meksikan delegacion kunformis 37 esperantistoj el 8 ŝtatoj: Oaxaca, Veracruz, Jalisco, Chihuahua, kaj la Ĉefurbo.

La Honora Komitato de la 75-a U.K. ja estis ege brila: la Ministro de Kulturo, la Vicprezidanto de la Kongreso de Ministroj, la Ministro de Eksteraj Rilatoj, la Ministro de Komunikado, kaj la Prezidantino de Unesko Komisiono.

La inaŭguro de la Kongreso estis prezidita de la Prezidento de la Respubliko Kubo, Fidel Castro Ruz, kiu dispartigis kun la prezidanto de U.E.A. kaj la prezidanto de Kuba E-o. Asocio, Jesus A. Castillo.

Kiel provizora prezidanto de M.E.F., mi amplekse informis pri tio al Lic. Alfonso de Mier y Campos, Director General de Asuntos Culturales de la Secretaria de Relaciones Exteriores de la República Mexicana, por respondi sian dokumenton: NUMERO 600280, EXPEDIENTE VI - 822(729,1) 1403, adresita al M.E.F.

Dum la disvolviĝo de la kongresaj laboroj, iu vespero dekoj da delegitoj ricevis inviton de la Prezidento Castro por vespermanĝi kun li en la Palaco de la Registaro. Po unu de la invititoj, ĉiuj estis prezentitaj por saluti lin nome de la koncerna landeveno. Poste li parolis al la ĉestantoj. Ja, historia parolado por esperantio; parolado kiun mi poste, jam hejmen, aŭskultis pere de la dimanĉaj radioelsendoj de Radio Habana, kaj kiujn mi duone sukcesis klare surbendigi. Jen kelkajn fragmenton:

Honora Komitato de la 75ª UK, okazinta en Havano, Kubo. Foto prenita el Esperanto Redakcio de Ĉina Radio Internacia.

Fidel Castro: "... voy a ser breve. Primero quiero decir que consideramos un gran honor que ustedes hayan escogido nuestro país para este congreso…", "...estoy seguro que este congreso va a impulsar el interés por esperanto en nuestro pueblo" "...y van a triunfar, porque la idea es muy justa...", "el presidente (de UEA) expresó una idea muy bella; que ustedes vinieron a discutir en Esperanto los problemas del mundo, yo diría que vinieron a discutir en Esperanto la esperanza del mundo…", "He tenido el placer de saludar a cada uno de ustedes, de los que están aquí presentes, ciudadanos de Cuba, ciudadanos de todo el mundo..." "...les doy las gracias muy

sinceramente por su visita, por lo mucho que he aprendido en este contacto con ustedes y por lo feliz que nos hemos sentido al encontrar personas universales, personas de paz. ¡Muchas Gracias!"

Traduko – interpreto: "... Mi parolos mallonge. Unue mi konsideras ke estas granda honoro ke vi elektis nian landon por tiu ĉi kongreso…", "…mi certas ke tiu ĉi kongreso impulsos la intereson pri Esperanto en nia popolo" "…kaj vi sukcesos ĉar la ideo estas justa...", "…la prezidanto (de UEA) esprimis tre belan ideon; vi venis por diskuti en Esperanto la mondajn problemojn, mi dirus ke vi venis por diskuti Esperante pri la mondespero…" "Mi havis la plezuron saluti ĉiun el vi, la ĉeestantojn, civitanojn de Kubo, civitanojn de la tuta mondo..." "...Mi tre sincere dankas vin pro via vizito, pro tiom multe kion mi lernis de tiu ĉi kontakto kun vi kaj pro la feliĉsento kiuj signifas renkonti universalajn personojn, pacpersonojn. Multan Dankon!"

MIA UNUA PARTOPRENO AL UNIVERSALA KONGRESO (UK)

Jean Codjo *(membro de Afrika Komisiono)*

UK 2009 en Bjalistoko estis mia tutunua kongreso, al kiu mi partoprenis dum mia dudekjara esperanta agado. Komparon mi ankoraŭ ne rajtas fari, ĉar al neniu alia mi antaŭe partoprenis. Sed, ĝi certe restos la plej grava, ĉar mi eniris la komitaton de UEA kiel C-komitatano. Eble por aliaj afrikanoj, jen venas tempo por okazigi ian miraklon. La miraklo, ĝi certe ne okazos, sed mi faros mian eblon por ke en afriko estu pli kaj pli efikaj

Jean Codjo kaj japaninoj dum la 94a UK, en Bjalistoko.

funkciantaj Landaj Asocioj, t.e asocioj, kiuj vere prizorgas sian membraron, alivorte asocioj kies estraro estu vere je la servo de la membroj, ne inverse. Nur kiam ni sukcesos funkciigi landan asocion, ke ni povos nin permesi lobiumi por iam okazigi UK-on en Afriko. Kompreneble, tio postulas efikan kunordigadon de ĉiuj talentoj, homfortoj, ktp. Ĉie en Afriko estas homoj kapablaj aranĝi UK-on, sed dise ili preskaŭ neniam sukcesos ion tian fari. La plej granda defio restas kiel kunigi tiujn talentojn. Estas klare, ke UK neniam okazos en Afriko, se afrikanoj mem ne konscias, ke ili unue devu meriti tion. Ĝis nun, multaj el ni daŭre kredas je Sankta Nikolao, kiu iun matenon metos je nia nazo la eblecon okazigi UK-on. Por ke io tia okazu post kvar aŭ kvin jaroj, ni devu ekde nun kunigi nian forton kaj talenton.

Jean Codjo antaŭ la informilo pri la 95a UK.

La UK 2009 permesis al mi iom konscii pri kondiĉoj aranĝi UK-on. Tian okazon ni devas doni al multaj aliaj afrikanoj. Por ke homoj sciu pri Afriko dum UK, necesas, ke estu budo funkcianta. Ofte nur eŭropanoj prizorgas tion. Estas nun tempo, ke afrikanoj kiuj intencas partopreni al UK antaŭe pripensu al preparado kaj deĵorado ĉe la budo. Tiel, eventualaj mecenatoj iom scios pri kiel iliaj donacoj estas uzataj. La afrika budo dum la UK 2009 ricevis multajn vizitojn. Mi esperas, ke tio instigos niajn mecenatojn daŭrigi helpi por la evoluo de la afrika agado.

De unu UK al la alia

Post la UK de Bialistoko mi ne plu povas imagi, ke mi povas min permesi ne partopreni al tiu de Kubo en la jaro 2010. Tio estos bela okazo kiun mi kaptos por

viziti tiun belan landon, sperti kuban kulturon, danci, vojaĝi al apudaj landoj kaj kompreneble renkonti aliajn esperantistojn.

NOVJARA RENKONTIĜO - POR FAMILIOJ KAJ UNUOPULOJ

***Lu Wunsch-Rolshoven**, EsperantoLand*

Kiam mi eklernis Esperanton en 1977, en Germanio ĉiujare okazis nur unu tutsemajna Esperanto-renkontiĝo, la Internacia Seminario (IS) de la Germana Esperanto-Junularo dum la silvestra semajno. Ĝi tiam havis ĉ. cent partoprenantojn. Intertempe en Germanio ĉiujare okazas ses unusemajnaj Esperanto-kunvenoj, al kiuj venas sume pli ol 700 homoj.

Esperantujo kreskas kaj kreskas kaj kreskas

La Esperanto-mondo signife grandiĝis dum la pasintaj tridek jaroj - kreiĝis unu paska kaj du someraj kunvenoj kaj du aldonaj jarfinaj aranĝoj, nome Internacia Festivalo (IF) kaj "Novjara Renkontiĝo" (NR). Tiun Novjaran Renkontiĝon mi fondis antaŭ 7 jaroj kaj plu organizas kun pluraj helpantoj.

En la unuaj du fojoj NR havis ĉ. 50 partoprenantojn, ekde tiam estas 120 ĝis 170 homoj. La ĉeestantoj venas el deko da landoj kaj mi estas tre feliĉa, ke germanoj estas malplimulto kaj pli ol du trionoj loĝas en eksterlando - ĉefe en Francio, Belgio kaj Svislando, sed ankaŭ en pli foraj landoj kiel Hispanio, Norvegio, Pollando, Rusio aŭ Kanado.

Infanoj dum Novjara Renkontiĝo

Granda renkontiĝo por familioj

Partoprenas en NR kutime 50 ĝis 60 infanoj kaj junuloj ekde beboj ĝis 20-jaruloj; ĉ. dudek el ili lernis Esperanton kiel denaskan lingvon. Dum la jaroj

kreiĝis pli kaj pli ampleksa programo por infanoj kaj junuloj, kiun brile gvidas Christoph Frank. Li estas pupteatroludisto kaj regule prezentas teatraĵon kun pupoj kaj persono.

Politiko kaj senstreĉiĝo

Por plenkreskuloj ni ofertas prelegojn kaj kursojn laŭ la proponoj de partoprenantoj. Ĉi-foje oni povos ekzemple aŭdi prelegon pri Komputeko (prikomputila terminokolekto), pri "EDE kaj UNU MONDO - Esperanto en politiko", pri manĝokutimoj aŭ pri Ĉinio: "De Tang-Dinastia Monahho al Simia Reĝo". En kursoj eblos praktiki Qigong, senstreĉiĝon aŭ meditadon. Okazos ankaŭ kelkaj ekskursoj kaj promenoj en la ĉirkaŭaĵo.

Koncertoj

En unu aŭ du vesperoj okazas koncerto de Esperanto-muzikistoj; ĝis nun prezentiĝis interalie Kim, Kajto, JoMo, Akordo kaj "Ĵomart kaj Nataŝa". Ĉi-foje muzikos Martin Wiese (li ludis en "Persone") kaj ankaŭ Lena Wilke kun teamo. Dum aliaj vesperoj okazas ludoj, muzikaj prezentoj de partoprenantoj, internacia vespero kaj kompreneble silvestra festo.

1-a Novjara Internacia Semajno (NIS)

La Internacia Seminario post 52-jara ekzisto ĵus kuniĝis kun la pola aranĝo "Ago-Semajno" al la nova JES, Junulara Esperanto-Semajno, kiu okazos en Zakopane en Pollando. Ni tamen deziris ebligi al junuloj el Germanio, Francio kaj najbaraj landoj la ĝuon de internacia renkontiĝo sen tro longaj vojaĝoj; do ni decidis oferti aldonan aranĝon por junuloj sub la nomo de "Novjara Internacia Semajno". Aliĝis ĉi-foje kvardeko da junuloj inter 14 kaj 35 jaroj. Unue ni pensis organizi ĝin en parto de la NR-domo - sed intertempe aliĝis entute tiom da homoj, ke ni devis lui plian domon, kie NIS povos sendepende okazi; la junularo certe ne bedaŭros...

VIRTUALAJ KONGRESOJ

Milan Sveda, *Ateliero Verda*

En 2002, la tiam funkcianta informservo de UEA nomata “Nun” fiere anoncis, ke la venontjara 88a UK 2003 en Gotenburgo estos “tute pionira”, ĉar estos la unua virtuala kongreso en historio de homaro. Ĉiu kongresano ricevis kontaktnumeron per kiu iu ajn el la tuta mondo povis kontakti lin/ŝin per elektronikaj mesaĝoj, tiel virtuale kongresumi. Por la nombro de 1792 kongresanoj estis disponeblaj 2 (du!) komputiloj por ebligi tion dum la daŭro de la kongreso. Rezulte, formiĝis longaj vicoj de ricevintoj de mesaĝoj. La mesaĝantoj devis pacience atendi multajn horojn por havi iliajn ŝancojn por ree mesaĝi kaj tiel gustumi virtualecon de la kongreso.

Ekde tiam, precipe dank’al la ĉiam avancanta sendrata teknologio, dum sekvaj jaroj pli kaj pli kongresanoj kunportis iliajn surgenuajn komputilojn por aktualigi la deziratajn kontaktojn. Evidentiĝis ke oni devas ŝanĝi la difinon de virtuala kongreso.

Pasintjare dum la 7a TAKE kongreso en Montrealo oni povis atesti novan koncepton de virtuala kongreso. Sur grandega ekrano en la kongresa halo estis ebleco libere paroli kun partoprenantoj de la Brazila Landa Kongreso, kiu okazis dum la samaj tagoj kiel TAKE. Preskaŭ kvazaŭ ĉiuj estis en la sama aŭlo.

Neeviteble, tio levigis ankoraŭ novajn demandojn:

1) “Ĉu vere estas tiom fora la ideo ke estonte Esperantistoj povos partopreni aŭ aktive aŭ pasive en laŭelektebla kongresa evento antaŭ komputiloj en iliaj hejmoj?”

2) “Kiaj estos la virtualaj kongresoj post tiam?”

POR LA HISTORIO DE ESPERANTO EN MEKSIKO

5a TAKE, ALIA EKZEMPLO DE KUNA LABORO EN MEKSIKO

Michael Porter

Kvankam jam pasis 8 jaroj post la realiĝo de la 5a TAKE en Meksikurbo, mi daŭre konservas klaran memoron pri la fortaj emocioj, ke tiu travivaĵo provizis al mi, sen mencii la novajn amikojn, la pli profundajn konojn pri la E-o movado, kaj aliajn profitojn de nekalkulebla valoro, kiujn mi ricevis.

Antaŭ longe mi forviŝis el mia komputero la dosierojn de tiuj tempoj, sed mi facile povas surpaperigi la centrajn ideojn. La afero komencis tiel: Leonora Torres konvokis urĝan kunvenon, se mi ne malbone memoras en la 2000a jaro, por pritrakti iun temon rilate al la E-o movado. Dum sufiĉe longa tempo mi ne komprenis pri kio ŝi paroladis, la vortoj "Kvina TAKE" ŝajnis al mi la hispanan vorton "ataque" kaj mi ne komprenis pri kiu "atako" oni konspiris. Finfine oni klarigis al mi, ke TAKE signifas "TutAmerika Kongreso de Esperanto", efektivigota en Aprilo de la 2001a jaro. Ankaŭ oni daŭre parolis pri io "freneza"--tio estas, mi aŭdis ion kiel "loco", kiu estis fakte "LKK", Loka Kongresa Komitato. Iom post iom mi ekkomprenis ke TAKE estas vere tre grava afero, kiu jam okazis en Brazilo, Argentino, Kostariko, Kolombio kaj Kanado. Mi komprenis ankaŭ, ke la ebleco akcepti vizitantojn de la tuta Amerika kontinento en Meksiko en tia granda kunveno estus unika, verŝajne ne revenonta dum mia vivtempo, kaj mi sentis devon akcepti la respondecon por helpi tiun gravan penon. Alivorte, mi eniris al LKK, pensante efektive "me he vuelto locoCO" (mi

freneziĝis). Sed ankoraŭ mi ne tute konsciis pri la historia signifo de tio, kion ni ĵus komencigis.

Kiel komitatano mi okupiĝis ĉefe pri la registro. Dum pli ol unu jaro, preskaŭ ĉiutage mi korespondis rete kun E-istoj de la tuta mondo, respondante iliajn demandojn pri kostoj de hoteloj, horaroj de flugoj, titoloj de prelegoj, ktp., sendante formalajn leterojn por ekhavi vizojn, kaj prizorgante diversajn detalojn. Ekzemple, Europanino petis al mi trovi por ŝi lokon por praktiki tenison dum la Kongreso, alimaniere ŝi tute ne venus. Al mi estis ege kontentige ricevi konsilojn de Atilio Orellana, UEA-Komisiito por Ameriko pri ĉiuj aspektoj de la organizado.

Meksikurbo estas grandega metropolo, kaj pro tio estas malfacile kunveni ofte. Ĉefe mi kunordigis mian laboron kun Leonora, kiu havis pli da kontakto kun la aliaj komitatanoj. Do, rezultis ke la plena amplekso de la evento estis nekonata de mi ĝis la lastaj momentoj. Mi povas rakonti ĉi tie, nur nebulan bildon de la Kongreso.

Hotelo “Baumer”, estis la sidejo de la Kongreso sed kelkaj programeroj okazis en salonoj de la Federala Registaro, ĉar Leonora havis amikecon kun kelkaj Registarmembroj, kiuj afable uzis sian privilegiojn por disponigi la Deputitan Ĉambron kaj aliajn spacojn, kiuj grande altigis la digno de la E-o movado.

Mi pensas, ke estis Leonora, kiu invitis al antropologo Miguel León-Portilla, elstara Meksika klerulo kaj spertulo pri Naŭatla literaturo, okaze de la prezentado de la nova traduko al E-o de lia libro “La visión de los vencidos” “Tra l’okuloj de la venkitoj” (jam tradukita en 15 lingvojn). D-ro León-Portilla akceptis esti la Honora Prezidanto de 5a TAKE.

Folkloraj dancoj dum la 5a TAKE, ĉefurbo de Meksiko.

Eble ankaŭ estis Leonora, kiu trovis muzikkomponiston kiu ludis piane la E-an himnon dum la inaŭguro. Fakte, la programo estis riĉa en arto, kun folkloraj dancoj,

ekspozicioj pri pentraĵoj, kanzonoj kaj aliaj kulturaĵoj. Multaj vizitantoj partoprenis en ekskursoj al piramidoj de Teotiŭakano kaj al kanaloj de Xochimilco, kie la kvar boatoj portis la vortojn "Esperanto", "Klara", "Ludoviko" kaj "MEF" kun grandegaj literoj faritaj el floroj. La kongresa temo estis "Ameriko: Unu Kontinento, Diversaj Historioj"; resumo de la ege interesaj prelegoj tro longigus ĉi tiun noteton.

Ekskurso al la kanaloj de Xochimilco.

Kiam mankis unu aŭ du tagoj antaŭ la fino de la Kongreso, Estela Gracia García, nia tiama kasistino, informis min, ke tiu tago la valoro de meksika peso subite pliiĝis. Tiu estis eksterordinara novaĵo--antaŭ ol tiu tago, dum pli ol dudek jaroj, ĉiutage la Usona dolaro plivaloriĝis rilate al la peso. La ebleco de malpliiĝo de la dolaro estis tiom nepensebla, ke mi tute ne komprenis, kion Estela intencis diri al mi, ĝis finfine frapis min la veron: ni ricevis de la partoprenantoj dolarajn pagojn, kaj devis pagi al la hotelo per pesoj! Ĉiuj niaj zorgemaj kalkuloj jam senutilis, sed iamaniere finfine ni sukcesis pagi la fakturon.

Laŭ Vikipedio, la 5a TAKE havis 169 aliĝintoj el 29 landoj kaj 4 kontinentoj; se mi memoras bone, proksimume 120 finfine ĉeestis, ĉar kelkaj dekoj de Afrikanoj ne recevis vizojn. Je la fino, pluraj partoprenantoj komentis ke la evento "similas pli al UK ol al TAKE", kaj unu el la reprezentantoj de Kubo diris al mi ke la sekvanta TAKE havus almenaŭ 17 organizantojn, por fari la laboron de nur 5 LKK-anoj en Meksiko.

Laŭ mia vidpunkto, la plej elstara aspekto de la organizo de la 5a TAKE, estis ke la komitatanoj sukcesis labori preskaŭ sendepende sed efektive, ĉiu tute fidante pri la kompetenteco de la alia. Kiam finfine alvenis la tago de la Kongreso, ĉiuj apartaj pecoj de la enigmo ĝuste enadaptiĝis, por surprizo kaj plezuro de ĉiuj.

LA 95a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO: INTERKOMPRENIĜO DE KULTUROJ

David López kaj Martin Schäffer

La Universala Kongreso de Esperanto (UK), unu el la plej grandaj manifestaĵoj rilate al la utileco kaj praktikeco de la Internacia Lingvo, estas organizata ĉiujare, kaj preskaŭ senĉese, ekde la komenco de la 20-a jarcento de la Universala Esperanto Asocio (UEA) kunlabore kun esperantistaj grupoj el la gastigaj landoj.

Ĉi tiu kolosa evento donas la ŝancon kunigi la plej grandan kvanton da esperanto-parolantoj el la tuta mondo kun la celo daŭrigi la kunlaboron por atingi interkomprenon inter la popoloj, lerni pri diversaj kulturoj, praktiki la senliman komunikadon kaj krei amikecajn rilatojn kadre de internacia etoso.

Venontan someron, la ĝoja gastiganto de la 95-a Universala Kongreso de Esperanto estos nia najbara kaj bela lando Kubo, la ĉefa kongresa temo estos: “Interkompreniĝo de Kulturoj” kaj okazos inter la 17a kaj la 24a de julio 2010.

Ni nepre rekomendas al vi kapti la okazon partopreni la diversajn renkontiĝojn en Kubo, ĉar por kelkaj meksikaj Esperanto-parolantoj temas pri ideala ebleco partopreni internaciajn kongresojn. Cubana de Aviación, la oficiala flugkompanio de la 95a UK, ofertas bonprezajn flugojn el du meksikaj urboj; Distrito Federal kaj Cancún. Provu ne nur resti dum unu semajno! Antaŭ UK okazos seminario en Matanzas, samtempe kun la ILEI-konferenco, kaj en Havano okazos kurso por komencintoj por trejni la lingvokonojn de personoj kiuj poste volas partopreni la

UKon. Ĉu vi jam estas pli aĝa ol 29? Ne gravas, tute ne estas aĝlimo por la Internacia Junulara Kongreso (IJK). Ankaŭ personoj multe pli aĝaj ofte partoprenas la IJKon.

Mapo el Kubo

Ĉiel, ni konsciu ke en la mondo estas multaj diversaj Esperanto-renkontiĝoj, ekz. je tiu ĉi jarfino okazas tri jarfinaj renkontiĝoj en Eŭropo, nome la Junulara Esperanto-Semajno (JES) en Pollando, la Novjara Renkontiĝo (NR) kaj Novjara Internacia Semajno (NIS) en la germana urbo Saarbrücken. Kune partoprenas plej verŝajne pli ol 650 homoj.

Memoru!, ĉiam kiam vi havu la eblon partopreni internacian renkontiĝon, faru tion! eble sen lasi vian loĝlokon vi povus tion sperti, renkontu eksterlandajn esperantistojn, kiam ili vizitu vian urbon, aliĝu al Pasporta Servo kaj praktiku la internacian komunikadon per Esperanto.

PRI LA INSTRUADO DE ESPERANTO EN MEKSIKO

LA ORAĜO

Sofía Carbot Rodríguez

En kelkaj landoj, inter ili Meksiko, oni diras ke maljunaĝo kaj "tria aĝo" estas sinonimoj, tamen; mi kunakordas pli kun homoj, kiuj metafore nomas tiun vivperiodon "la Oran-Aĝon", pro tio ke tiam ni rekonstruas ĉiujn niajn pasintajn agadojn kaj decidas profiti la restantan tempon starigante novajn celojn, kiujn ni ne plenigis antaŭe.

Estas falsega ideo ke dum tiu aĝo mortas ĉio… tute kontraue, ĝi estas la komenco de dua vivo en kiu ekzistas multe da seriozeco kaj firmecdecidoj. Tial mi, kiel Esperanta instruistino de oraĝaj personoj, estas tute konvikita ke la plejmulto de tiaj homoj havas grandegan emon lerni novajn aferojn kaj kapablas tion fari, kompreneble la lernrapideco plifortiĝas kiam ili entuziasmiĝas. Rilate al la lernado de Esperanto, tiu entuziasmo dependas de ili mem sed ankaŭ de la apogo, kiun ni, la jam pli spertaj samideanoj, povas doni al ili.

Fine menciindas unu el la grandaj avantaĝoj de la Esperanto-lernado dum la oraĝo; kies oni povas uzi en la ĉiutaga vivo; per la lernado de facila kaj senescepta lingvo, oni laborigas la neŭronojn kaj la memorkapablo pliboniĝas.

Je mia flanko tre kontentas pro iel kontribui konservi la vivkvaliton de miaj gelernantoj kaj esperas ke malgraŭ la aĝo eble baldaŭ fariĝos novaj Esperanto-instruistoj.

LA ESPERANTO-INSTRUADO EN MIA LERNEJO

Alberto Montero

Ekde la seminario kaj la intensa kurso, kiujn mi ĉeestis antaŭ la 10a Meksika Esperanto Kongreso ĉe la Universitato Nacia Aŭtonoma de Meksiko (UNAM) lastan junion, mi havis la ideon diskonigi Esperanton kaj tiam mi konfirmis ke la plej bona maniero, krom prezenti la lingvon, estas instrui ĝin.

Post mia partopreno en la menciitaj eventoj, mi ekinstruis Esperanton al mia avino kaj patro, sed ili ne havis multe da tempo por lerni ĝin, do estis bezonata serĉi aliajn lernantojn. Tiam mi telefonis amikon kaj demandis; ĉu vi interesiĝus lerni esperanton? la respondo estis jesa. Dumsomere mi iris iun tagon lernejen por instrui esperanton al mia amiko, dumvoje mi renkontis aliajn homojn kiuj demandis min ĉu ili ankaŭ povus lerni esperanton. Tiel ekis mia nova sperto havante etan grupon da ses homoj, kiuj eklernis la esperantan lingvon. Bedaŭrinde pro diversaj kaŭzoj ne okazis alia renkontiĝo kun tiuj ses uloj, kvankam mi informis ilin ke je la sekva lernejperiodo ni povus daŭri kun la lernado de la Internacia Lingvo.

Malfeliĉe miaj du unuaj instruprovoj ne sukcesis, tial miaj iluzioj instrui esperanton preskaŭ mortis, sed kelkaj tagoj poste

al mi venis iluzikuracistino; amikino mia kiu montris sin tre interesata pri esperanto. Denove mia laboro komencis kaj, per ŝia helpo, ni kunigis kvin personojn por lerni esperanton.

Dum kelkaj semanoj ni renkontiĝis en eta salono por la instru-lernado, ĉiuj estis tre entuziasmiĝitaj pro la facileco de Esperanto kompare kun la franca aŭ angla. Interese estas ke poste miaj novaj gelernantoj parolis pri la lingvo al aliaj amikoj kun la celo ke ili ankaŭ konu ĝin. Fine mia tria provo sukcesis danke al mia konvinko pri la bona funkcio de la verda lingvo kaj al la interesiĝo de miaj lastaj gelernantoj.

Mi kredas ke Esperanto devus esti diskonigita por atingi la ĉefajn celojn; tio estas nepra, ke Esperanto estu instruata de tiuj, kiuj ĝin parolas. Antaŭe, dum mi aliforme provis kontribueti en la esperanta movado, mi rimarkis ke estas tre komplika esperantigi homojn nur dirante; iru al lernu.net!, lernu la lingvon tie!, laŭ mia sperto, malmultaj aŭdas tiun rekomendon. En mia lernejo, eĉ instruisto pri kemio menciis la gelernantojn ke li lernis Esperanton, ne multaj interesiĝis pri la temo…

Bedaŭrinde estas malfacile starigi fiksan kurson de Esperanto ĉe Tecnológico de Monterrey; la horaro de ĉiu homo estas malsama kaj, laŭ mia scio, ne estas alia Esperanta instruisto krom mi.

Kvankam la mokinsultoj, kiujn mi ricevis pro esti esperantisto, mi feliĉas ĉar aliaj demandis min respekte pri la lingvo. Mi klopodos fiere sekvi la Esperantan varbadon kaj instruadon dum 2010, tiel ĉiufoje pli da personoj scios kio estas Esperanto kaj se kelkaj el ili ĝin lernos, estos granda progreso por la Internacia Lingvo kaj sia movado.

LASTAJ RIMARKINDAJ AKTIVECOJ EN MEKSIKO



Inter la 18a kaj 21a de junio sukcese okazis la ***10a Meksika Esperanto Kongreso,*** kies temo estis; "Lingvistika Diverseco en Meksiko: Fundamenta Parto de ĝia Kulturo", ĝin partoprenis 58 esperantistoj el 5 landoj; Germanio, Hispanio, Kubo, Meksiko kaj Usono. La tutan raporton pri tiu okazaĵo vi povas legi ĉe http://www.esperanto-mexico.org/files/kongresraporto10aMEK.pdf

---

Post la partopreno de Gilda Muñoz en Lingvaj Kongresoj okazintaj en la Universitato Aŭtonoma de Baja California (UABC) lastan septembron, nia plej aktiva esperantistino en Tijuana, havis seriozan babiladon kun la direktoro de tiu Universitato kun la celo instrui oficiale ***Esperanton en la UABC***, la reago de la estro estis bona kaj malferma al tiu propono. En novembro 2009 ni prezentis instruprogramon nomatan: ***"Esperanto: lengua y cultura",*** kiun faris Gilda kune kun Mallely Martínez kaj kontrolis Daniel Moreno kaj Atilio Orellana. Ni nur atendu la respondon, kiu espereble estu pozitiva.

Je la komenco de la lasta septembro preskaŭ la tuta estraro de MEF: Daniel Moreno, Mallely Martínez, David López kaj Martha Cárdenas, kune kun Martin Schäffer kaj Neil Blonstein partoprenis, kiel ***reprezentantoj de UEA*** antaŭ

Unuiĝintaj Nacioj, en la 62a Konferenco de Neregistaraj Organizoj okazinta en la ĉefurbo de Meksiko. La teamo de UEA distribuis diversajn informfoliojn pri Esperanto kiel ekzemple "La pozicio de UEA pri lingvaj rajtoj", "Praga Manifesto" kaj ĝeneralaj informoj, ankaŭ la reprezentatoj havis interparolojn kun aliaj delegitoj, multaj volontuloj de la konferenco kaj kun lokaj ĵurnalistoj. Pri tiu ĉi agado estas artikolo publikita en la novembra numero de la revuo “Esperanto”.



La estraro de MEF, volas danki kaj gratuli la aktivajn ***geesperantistojn el Guadalajara***, ĉefe al Sara González kaj Ulises Franco, kiuj dum la lastaj monatoj preskaŭ dum ĉiu semajnfino organizis renkontiĝojn en tiu urbo por lerni, praktiki la lingvon kaj esperantigi homojn.

Ni profitas la okazon doni varman bonvenon al ***lernantinoj de Sofía Cabot***, kiuj entuziasme sekvas la lernadon de Esperanto kaj kiuj antaŭ nelonge aliĝis al Meksika Esperanto Federacio.

Ankaŭ ĉi tie ni volas doni al nia membraro ***mesaĝon*** ricevitan ***de Maritza Gutiérrez***, membro de la estraro de Amerika Komisiono kaj de nia landa asocio:

- Bonvolu transdoni elkoran bondeziron al ĉiuj mef-anoj okaze de la nova jaro kaj mian instigon al plia agado por plifortigo de la amerika movado. Sendube la ***meksika esperantistaro multe kontribuis en 2009 al tiu celo*** kaj mi esperas ke en 2010 vi same vigle kaj entuziasme laboros por Esperanto. Okaze de la ***UK*** kaj ***aliaj eventoj internaciaj en Kubo***, mi tre esperas ke ***multaj meksikanoj venu*** kaj kunlaboru al sukceso de la kongreso kiu ankaŭ vias

PRI EKSTERLANDA AGADO

ESPERANTO EN MALLUKSA AFRIKO

Johan Derks

La kresko de esperantistoj en kelkaj tre malriĉaj landoj montras ke Esperanto ne estas nur luksaĵo praktikata de intelektuloj en riĉaj landoj. Statistikoj mankas, sed se dedukti el la novaĵoj en 'ESPERANTO EN AFRIKO', bulteno de la Afrika Komisiono de UEA, la kursoj multobliĝas dum la lastaj jaroj en Togo, Benino, kaj Burundo, dum en aliaj landoj: Malagasujo, Angolo, Niĝerlando kaj Ebura Bordo (kelkaj ankaŭ diras Kotdivuaro) la organizaĵoj de esperantistoj estas bone establitaj kun kongresoj, okazas kursoj, ekzamenoj ktp.

Dum Afriko enhavas 54 suverenajn ŝtatojn, en 23 el ili esperantistoj estas konataj internacie kaj esperantaj grupoj konatas en 17 landoj. Ok el tiuj dek-sep havas landajn asociojn aliĝintajn al UEA. Unu fakto devus alarmeti nin: Tiuj ok landoj, malkrom Sud-Afriko, estas ĉiuj franclingvaj. La nuraj anglalingvaj landoj kie vivas esperantistoj estas Tanzanio kaj Ganao. Ne povas ne esti rilato kun tio, ke la angla estas sufiĉe superregema aŭ/kaj Esperanto forte apogiĝas sur la franclingva vortotrezoro.

En januaro 2009 Svetlana Milanović kaj mi mem donis kursojn por komencantoj kaj progresantoj en Burundo, ĉe la lago Tanganjiko, unu el la dek plej malriĉaj landoj de la mondo. Ni suferis malluksecon, maleston de taŭgaj nutraĵoj, noktan bruadon kaj malpurecon, sed ni hontas diri tion, ĉar la periodo de suferado por ni estis nur

unu monato, do pli bone plendu pro la daŭraj suferadoj de la afrikanoj ol pro la propraj nekonvenaĵoj.

Ĉar la entuziasmo por niaj kursoj estis ege granda, ni engaĝiĝis ne nur bone instrui ilin, sed ankaŭ trovi manierojn por helpi organizi ilian asocion. Pro la malriĉeco kotizado de membroj de kluboj estas nepraktikebla. Jam kurslibrojn la burundanoj ne povas aĉeti kaj se iu havas kurslibreton, ĝi estas baldaŭ ĉifonita pro eluzado tra multaj fingroj, pro manko de bona formetujo, ekzemple libroŝranketo.

Kion fari? Ni elpensis kaj decidis helpi starigi Esperanto-centron, kie la lokaj esperantistoj povos renkontiĝi, kie gardatos Esperanto-libroj kaj kie, por havi enspezojn, estos komputiloj kun ret-aliro por la paganta publiko. La konstruado de la centro devos esti financata pere de monvarbado inter pli riĉaj esperantistoj en la mondo.

En 2009 ni fondis fondaĵon “Esperanto en evoluo” kun propra retejo, kiu celas ne nur helpi financi la Esperanto-centron en Burundo, sed “ĉiujn profitodonajn projektojn en malriĉaj landoj, kiuj celas doni bezonatan financan bazon al la tiea Esperanto-movado", tiel tekstas la statuto.

Nia kampanjo komenciĝis dum la Universala Kongreso, kun ankoraŭ nekonata sukceso, sed certe la burundaj esperantistoj bezonas ankaŭ financan helpon de legantoj de “Ni ĉiuj”.

Se vi volas scii pli, klaku al http://esp-evoluo.tk, kie vi konatiĝos kun la internacia estraro, la urbo Rumonge, kie la Esperanto-centro estas planita kaj kun niaj amikoj tie. La kontonumero por donaci al la centro estas 1312.96.116 de "St. Esperanto en evoluo" favore al 378964 ĉe RABObank, Nederlando (la BIC estas PSTB NL21 aŭ uzu IBAN-numeron NL24PSTB0000378964). Ankaŭ ĉe UEA estas konto nia kun kodo eeer-u.



Esperanto lingvo-literaturo-movado

Pierre Janton en ĉi tiu libro montras science kaj koncize kio estas la "Internacia Lingvo". Li parolas pri gravaj aspektoj kiel:
- ĝia origo kaj historio kiel artefarita lingvo,
- ĝia uzo kaj evoluo,
- Esperanto kiel ideologia fenomeno,
- la movado, literaturo, inter aliaj temoj.

Do, entute tre interesa verko, kiun ĉiu esperantisto devus koni por esti pli bone informita pri la esperanta movado internacie, samtempe estas helpilo por tiuj, kiuj volas sciigi aliajn pri la verda lingvo per solidaj fundamentoj kaj ekzaktaj datoj.
Se vi ankoraŭ ne havas ĝin, faru vian mendon al Meksika Esperanto Federacio. La prezo estas $160.00 (cent sesdek meksikaj pesoj) plus sendokostoj.

SUAD estas dek-sep jara, ŝi estas enamiĝinta. En ŝia vilaĝo, kiel en multaj aliaj, amoro antaŭ edziniĝo estas sinonimo de morto...
Vivbruligita estas romano originale verkita en la franca kaj tradukita al 25 lingvoj, inter ili, Esperanto. Temas pri historio de virino el Cisjordanio kiu pasis koŝmaron kaj mirakle travivis la tiel nomata "honorkrimo". Dum ĝia legado, oni spertas la kunigon de pluraj emociegaj sentoj. **Vivibruligita** ne estas nur legaĵo sed ankaŭ alvoko. Ni devas rompi la neelteneblan silentotabuon, kiu kaŝas la morton de tiuj virinoj. Viktimoj de la leĝo de viroj.
Indas legi ĝin kaj koni tian realan kaj teruran historion, kiun multaj virinoj en la tuta mondo ankoraŭ spertas. Vi povas trovi tiun verkon en la libro-servo de MEF. La prezo estas $280.00 (ducent okdek meksikaj pesoj) plus sendokostoj.